BELGIO NEDERLANDO GERMANIO E
Senlime
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzenh@gmx.net



# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jmjsenlime@planetinternet.be
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-43-3062015
Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

Tiu-ĉi informilo aperas kvarfoje en jaro.

**Jara abono / aliĝo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
BE-4800 VERVIERS

**Nederlando** :
ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi provizore bonvolu uzi alian konton.

**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aŭ januaro). La kotizintaj membroj principe ĝuas rabaton okaze de aliĝo al Trilanda Renkontiĝo organizita de ***Senlime***.

## *Senlime* dekjara !

La unua kunsido de reprezentantoj de Eo-kluboj en la Trilanda Regiono okazis dimanĉon la 31an de januaro 1993 de la 11a horo ĝis la 16a horo kunvoke de Marie DAENEN en Welkenraedt. Krom tiu-ĉi, ankaŭ ĉeestis Mia MARTENS, Annelies SOUREN, Trude SINNO, Mathieu SCHRYMECKER, Wolfgang BIENEN, Jean-Marie JACQUES, Benoit SCHEUREN kaj Uwe-Joachim MORITZ.

Ĉiuj konsentis, ke utilis *« krei kunordigan komitaton en kiu estu membroj reprezentantoj de Nederlando, Germanio, Valonio kaj Belgia Limburgo (tio estas de la kvar subregionoj de Eŭregio Mozo-Rejno) ».* Ili do devas esti konsideritaj kiel fondintoj de ***Senlime*** (kvankam tiu nomo jam ne estis elektita).

La du sekvantaj kunvenoj respektive okazis en Vaals, la 21an de marto, kaj en Wijlre, la 31an de majo. Dum tiu-ĉi kunveno jam estis priparolitaj projekto pri aliĝilo, statuto kaj regularo, kalendaro de estontaj Trilandaj Renkontiĝoj… kaj nomo de la asocio.

## *Senlime* a dix ans !

La première réunion de représentants de clubs espérantistes de la région des « rencontres des 3 pays » a eu lieu le dimanche 31 janvier 1993 de 11h. à 16h. sur convocation de Marie DAENEN à Welkenraedt. Outre celle-ci, étaient aussi présents Mia MARTENS, Annelies SOUREN, Trude SINNO, Mathieu SCHRYMECKER, Wolfgang BIENEN, Jean-Marie JACQUES, Benoit SCHEUREN et Uwe-Joachim MORITZ.

Tous se mirent d'accord qu'il était utile de *« créer un comité de coordination dont devaient être membres des représentants des Pays-Bas, d'Allemagne, de Wallonie et du Limbourg belge (c-à-d. des quatre sous-régions de l'Euregio Meuse-Rhin) ».* Ils doivent donc être considérés comme les fondateurs de ***Senlime*** (quoique ce nom n'avait pas encore été choisi).

Les deux réunions suivantes eurent lieu respectivement à Vaals, le 21 mars, et à Wijlre, la 31 mai. Lors de cette réunion furent déjà discutés un projet de bulletin d'inscription, statut et règlement, calendrier des futures « Trilandaj Renkontiĝoj »… et nom de l'association.

# Prezento de *Senlime (1)*

## TERITORIO

La Eŭregiono Mozo-Rejno konsistas el la belgaj provincoj Limburgo (800.000 enloĝantoj) kaj Lieĝo (1 miliono da enloĝantoj), el la suda parto de nederlanda Limburgo (700.000 enloĝantoj), kaj el la subregiono Akeno (parto de la distrikto Kolonjo, kun pli ol 1 miliono da enloĝantoj).

Tiu trilingva regiono, kie lingvaj kaj naciaj limoj ne kongruas, travivis longan komunan historion. Kontakt-punkto inter tri gravaj kulturaj fluoj, la Eŭregiono Mozo-Rejno celas Eŭropan Unuiĝon.

## HISTORIO

Jam de antaŭ la dua mondmilito, esperantistoj el la tri najbaraj landoj kutimis renkontiĝi. Ili ofte biciklis kaj tranoktadis unu ĉe la alia.

El tio naskiĝis la tiel nomataj "Trilandaj Renkontiĝoj", kiuj ankoraŭ nun ĉiujare (printempe kaj aŭtune) okazas en tiu regiono.

Ĉiu el la regionaj esperanto-grupoj (Akena, Marnolanda, Verviersa,...) siavice organizis la Trilandajn Renkontiĝojn. Plurfoje, grupeto da volontuloj klopodis starigi ian konstantan organizan komitaton, kun pli-malpli mallonga sukceso.

Tiel, iom post iom, naskiĝis la ideo transiri de Trilanda Renkontiĝo al trilanda asocio. Tiu-ĉi oficiale fondiĝis la 17-an de oktobro 1993, okaze de historia Trilanda Renkontiĝo en Kelmis (Belgio), renkontiĝo kies temo estis la iama esperantista projekto pri (esperantlingva) ŝtato en proksima Neŭtrala Moresnet.

Unu jaron poste, okaze de alia Trilanda Renkontiĝo, ĉi-foje en Comblain-au-Pont (Belgio), la dua Ĝenerala Asembleo de la membroj aprobis la definitivan statuton kaj la internan funkciadon de la Asocio.

## ORGANIZO

La Asocio estas estrata de la Ĝenerala Asembleo, kunvenanta ĉiujare okaze de Trilanda Renkontiĝo, sed la ĉiutaga vivo de la asocio estas prizorgata de komitato (kunvenanta ĉiun duan monaton), kiu konsistas el:
- tri sekretarioj (unu por ĉiu lingvo), inter kiuj unu ĝenerala sekretario;
- tri kasistoj (unu por ĉiu lando), inter kiuj unu centra kasisto;
- aliaj konstantaj kunlaborantoj (pri taskoj kune difinitaj, laŭ la artikolo 10-a de la statuto).

Unu el la ĉefaj taskoj de la komitato estas la organizado de la Trilandaj Renkontiĝoj. La komitato sendas personan invitilon kaj informojn pri renkontiĝoj kaj pri aliaj asociaj aferoj al ĉiu kotizanta membro (tiu-ĉi krome ĝuas rabaton okaze de ĉiu Trilanda Renkontiĝo).

## ALIĜO

Membriĝo validos nur post pago de la kotizo (nune 10 EUR). Bonvolu peti aliĝilon (kaj pliajn informojn) de:

Heinrich LENTZEN
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzenh@gmx.net

## REGULARO

ART. 1.- La komitato principe kunvenas ĉiun duan monaton en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĉiu komitat-kunveno finiĝas per elekto de la loko, provizora tagordo kaj dato de la sekvonta kunsido.

ART. 2.- Ĉiu komitatano, kiu ne povos partopreni komitat-kunvenon, antaŭe informu la gastiganton pri tio kaj konigu sian opinion pri la tagordaj punktoj.

ART. 3. - Ĉiu komitatano, laŭ alfabeta ordo, protokolu pri la disvolvo de la kunveno. La protokolon ĝi, kiel eble plej rapide, sendu al ĉiu komitatano senescepte, kun la oficiala invito nepre partopreni la sekvontan kunvenon.

ART. 4. - Ĉiu komitatano reprezentu kaj informu sian lokan grupon ĉe/pri la komitato, kaj inverse. Krome ĝi plenumu konstantajn aŭ provizorajn taskojn kune difinitajn konforme al la artikolo 10 de la statuto.

ART. 5. - Ĉiu komitatano rajtas agi nome de la komitato, ĉu sekve de difinita mandato, ĉu propriniciate (pro grava kialo aŭ urĝo). Raporto estu tuj farita al la sidejo kaj eventuale al la interesataj komitatanoj.

ART. 6. - La komitatano responsa pri la sidejo, kalkulinte pri la urĝo, la kostoj kaj aliaj kondiĉoj, kiel eble plej rapide transdonu la ricevitajn informojn al la aliaj komitatanoj.

ART. 7. - La asocio disponu pri konto en financa instituto de ĉiu el la tri landoj. Tiu konto ricevu la kotizojn kaj aliajn pagojn.

ART. 8. - Ĉiujare, antaŭ la 10-a de januaro, ĉiu komitatano prezentu al la komitatano responsa pri financoj sian konton pri elspezoj; tiu-ĉi, post kontrolo, donos la necesajn pagpermesojn al la landaj kasistoj.

ART. 9. - Komitatanoj kiuj senkaŭze ne partoprenas en la komitataj kunsidoj ne estos proponitaj kiel novaj komitatanoj dum la sekvonta Ĝenerala Asembleo.

Kelmis, la 17-an de oktobro 1993
Kombleno, la 23-an de oktobro 1994

*Daŭrigo p. 3*

# Prezento de *Senlime* (2)

## STATUTO

ART. 1. - La asocio *"Senlime"* celas plifortigi la interpopolan interkompreniĝon helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Eŭregiono Mozo-Rejno.
Ĝia nuna sidejo estas:
Tienbundersweg 38
NL-6321 CR WIJLRE.

ART. 2. - 1. Membro estas ĉiu esperantisto loĝanta en la Eŭropa Unio, kiu interesiĝas pri la Eŭregiono Mozo-Rejno kaj kiu apogas la asocion.
2. Inter la membroj estu minimume unu civitano el Belgio, unu el Nederlando kaj unu el Germanio.
3. La membroj pagu kotizon fiksitan de la Ĝenerala Asembleo.
4. Tiu kotizo ne superu 10 EKUojn en la jaro 1995a (aŭ egalvaloron en nacia valuto) sed estu adaptebla laŭ la evoluo de la vivkosto.

ART. 3. - La Ĝenerala Asembleo de la Asocio kunvenas kadre de "Trilanda Renkontiĝo" organizita en la Eŭregiono Mozo-Rejno. La membroj (laŭ la artikolo dua) estas persone invititaj minimume kvar semajnojn antaŭ la renkontiĝo.

ART. 4. - La rolo de la Ĝenerala Asembleo konsistas el la rajtoj
1. aprobi kaj modifi la statuton;
2. elekti kaj eksigi la membrojn de la komitato;
3. aprobi la jarajn raportojn, agadplanojn,
bugetojn kaj kontojn;
4. eksigi membro(j)n;
5. malfondi la asocion;
6. fiksi sidejo(j)n de la asocio.

ART. 5. - La Ĝenerala Asembleo rajtas decidi pri statutoj, malfondo de la asocio aŭ eksigo de membro(j) nur kiam ĝi estis tiucele kunvokita.

ART. 6. - Membro eksigita aŭ eksiĝinta havas nenian rajton rilate al la kapitalo de la asocio.

ART. 7. - La administra komitato konsistas el membroj, laŭeble reprezentantaj ĉiujn grupojn, kaj esperantistoj pretaj aktive kunlabori kun la asocio (ekzemple organizante "Trilandan Renkontiĝon") en ĝia regiono.

ART. 8. - La komitato funkcias laŭ interna regularo aprobita de Ĝenerala Asembleo.

ART. 9. - La membroj de la komitato ne kontraktas, pro siaj funkcioj, ian ajn personan devigon kaj responsas nur pri la plenumo de sia mandato. Tiu-ĉi estu senpage plenumita.

ART. 10. - La taskoj, plenumendaj de la komitato, estas
1. prizorgado de la listo de la membroj laŭ la artikolo dua;
2. buĝetoj kaj kontoj, ĉiutaga administrado de la asocio;
3. kunordigo de la esperantista agado en la Eŭregiono Mozo-Rejno;
4. planado de la Trilandaj Renkontiĝoj;
5. kontaktoj kun gazetoj, asocioj kaj individuoj (esperantistaj aŭ ne).
La supra listo estas ekzempla kaj ne limiga.

ART. 11. - La kontregistrada periodo komenciĝas la 1-an de januaro kaj finiĝas la 31-an de decembro. Esceptokaze, la unua periodo, kiu komenciĝis la 17-an de oktobro 1993, finiĝos la 31-an de decembro 1994.

ART. 12. - La kontoj de la asocio kaj la decidoj de la Ĝenerala Asembleo estu notitaj en kajeron konservitan kaj konsulteblan en la sidejo. Kopio de tiuj informoj eventuale povas esti poŝte sendita.

ART. 13. - Okaze de malfondiĝo de la Asocio, la saldo estos transdonita al UEA (Universala Esperanto-Asocio).

Kombleno, la 23-an de oktobro 1994

## EVOLUO

Se, komence, la komitato plenumis sian kunordigan rolon inter la diversaj Eŭregionaj esperanto-kluboj, oni iom post iom devis bedaŭri la malaperon de tiuj-ĉi, ĉefe pro maljuniĝo de siaj respektivaj komitatanoj.

*Senlime* iom post iom iĝis la sola organizanto de ĉiuj trilandaj renkontiĝoj (krom la Lieĝaj) kaj mem organizis klub-kunvenojn, ĉiumonate en Select (Kelmis). Ĝi ankaŭ starigis sian propran, profesinevelan ttt-ejon (http://www.ping.be/jmjsenlime) kaj ankaŭ ekeldonis la informilon kiun vi nun enmanas.

*Senlime* do tiel fariĝis relative granda esperanto-grupo en la trilandlima regiono de Moresnet-Kelmis… sed samtempe ne plu havas kunordigan taskon… ĉar restas preskaŭ nenio por kunordigi !

Plej gravas, ke la organizo de trilanda renkontiĝo iĝas tre malfacila. Imagu kio okazos se UEA ne plu disponus pli loka organiza komitato por organizi la universalan kongreson. Ĉu, ekzemple, nur franclingva esperantisto kapablas - je distanco da 30 km aŭ pli – sole organizi trilandan renkontiĝon en nederlandlingva aŭ germanlingva regiono ?

## ALVOKO

Konsekvence ni, komitatanoj de *Senlime*, plian fojon petadas kunlaboron de la lokaj esperantistoj : surloke helpu nin aŭ aniĝu nian komitaton. Tiu alvoko aparte direktiĝas al la Limburganoj (ĉu Belgiaj, ĉu Nederlandaj).

Necesas eĉ jam de nun atenti pri la ART. 2/2 de la statuto, kiu riskas kaŭzi malaperon de *Senlime* pro manko da Nederlandanoj ! Necesas nun decidi ĉu tia ilo indas pluvivi kaj konsekvence agi.

# De Babelo al ESPERANTO

## BABELA TURO

Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis[…]. Kaj ili diris : Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris : Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas ; kaj jen, kion ili komencas fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon.

GENEZO 11

**Ĉu biblia malbeno aŭ ne, la nuna multlingveco trudas al ni diversajn problemojn kaj kostojn…**

## Aviadaj katastrofoj

La usona televido NBC raportis pri 345 nekompreneblaj "kraŝoj" aŭ kvazaŭ-kraŝoj sekve de lingvaj problemoj de januaro 1988 ĝis junio 2000 (dudeko monate !) koncerne denaskajn usonajn pilotojn.

El tiuj akcidentoj, 95 okazis en Usono kaj 250 en aliaj landoj. Sed kiom da « lingvaj » akcidentoj en la 95 % de la alia mondparto, kiu ne konas la anglan sed estas devigata ĝin uzi ?

La plej katastrofa akcidento el la tutmonda aviadila historio, en kiu pereis 583 homoj (Tenerifo, 1977), estis kaŭzita de Nederlanda piloto, kiu ne estis kompreninta anglalingvan mesaĝon senditan de la kontrola turo.

## Pecrot (BE)

La raporto de la justica eksperto komisiita al la ekzameno de la kaŭzoj de la fervoja katastrofo en Pecrot (Belgio), kiu mortigis 8 homojn kaj vundis multajn aliajn la 27an de marto 2001, rakontas, minuto post minuto, la disvolvo de la faktoj.

Je la 8h42, la vagonaro 709 forlasas la stacidomon Wavre. La kondukitsto vidis ke la akompanantino estis ferminta la pordojn ; li ne rimarkis ke la signalo, nevidebla el lia kajuto ĉar ĝi situis kvar metrojn almonte, estis ruĝa. Ok minutojn poste, la vagonaro 709 perkutis en Pecrot trajnon foririntan el Loveno [Leuven].

Je la 8h44, la signalisto el la bloko 4 en Wavre, kiu vidis ke la foririnta vagonaro malrespektis la ruĝan signalon, telefonalvokas Lovenon por malhelpi la foriron de la trajno Loveno-Wavre. La du homoj, ambaù unulingvaj, ne komprenas unu la alian (la kompleta surbendigo de ilia konversacio estis dissendita de la nacia radio –RTBF- la sekvantan matenon dum la parolita gazeto de la 7a horo).

Krom la malbona pozicio de la signalo nerespektita de la kondukinto, la raporto de la eksperto notas, flanke de la SNCB (belga fervoja nacia societo), mankon de preparado de la laboristoj pri krizaj situacioj. Ĝi ankaŭ malkaŝas la ekziston de lingvaj problemoj en la regionoj ĉe la lingva limo...

---

*Mi publikigas ĉion-ĉi en esperanto, okaze de la dek-jariĝo de* ***Senlime****, esperante tiel instigi miajn germanlingvajn kaj nederlandlingvajn geamikojn traduki tiujn tekstojn aŭ same prepari ion tian por nacilingve eldoni en ĉiujara « sintezo de niaj opinioj »…*

*J.-M.* ***Jacques***

## AL PERFEKTA LINGVO

Dum la jarcentoj kiam la lingva kaj politika unuo de la Romia mondo ekfalas, kaj ekaŭdeblas la lingvoj nun ankoraŭ Eŭrope parolataj, la eŭropa kulturo denove meditas la biblian epizodon pri la *«confusio linguarum»* kaj klopodas flegi la vundon de la Babel-a turo, provante retrovi la Adam-an lingvon, aŭ rekonstrui ĝin, «***Serĉe al la Perfekta Lingvo***» (Umberto ECO).

Post provoj pri komplete artefaritaj lingvoj (Dalgarno, Letellier, Solresol,…), homoj preferis simpligi ekzkzistantajn aŭ mortintajn lingvojn (latino sine flexione, basic,…). Ĉio vane. Nur iom sukcesis lingvoj logike kreitaj ekde naturaj radikoj, kiel Volapük aŭ esperanto.

Esperanto estas transnacia lingvo, kies nomo signifas : « tiu, kiu esperas ». Tio estis la pseŭdonimo de la iniciatinto de tiu lingvo : D-ro Zamenhof, kuracisto kaj lingvisto, kiu ĝin proponis en 1887 en Varsovio.

Precize konceptita, Esperanto estas facile lernebla, eĉ sole aŭ perkoresponde. Ĝia facileco rezultas el regula gramatiko kaj derivada sistemo kiu ebligas nature krei la vortojn per internaciaj radikoj.

En lia libro, «***Serĉe al la Perfekta Lingvo***», Umberto ECO prave asertas ke « Se la emo al Eŭropa unuiĝo iras kun multiĝo de la lingvoj, la ununura solvo kuŝas en la adopto de eŭropa komunikada lingvo ». Li eĉ aldonas, ke « Esperanto povus do funkcii kiel internacia lingvo same kiel tial funkciis, dum la jarcentoj, naturaj lingvoj kiel la greka, la franca, la angla aŭ la svahilia ».

Se ne, post la aliĝo de dek novaj regnoj, la nombro da lingvo uzataj en Eŭropo transpasos de 11 al 21 kaj eksplodigos la nombron da interpretistoj kaj la kostojn…

# ESPERANTO

## Euxregiona kalendaro 2003 (1)




Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Eŭregiono Mozo-Rejno, ***Senlime*** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono.

Ĝi eventuale povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** principe okazas ĉiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264.

Ĝi aperas papere kaj rete (ankaŭ en formato legebla de iMode-aparatoj).

***Bonvenon al cxiuj... sed, pro eblaj program-sxangxoj, nepre kontaktu la lokan organizanton aux grupon antaux ol partopreni aktivajxon.***

©

**LASTMINUTA INFORMO** : ĵus aperis la 20an de decembro plej pozitiva kaj esperdona (3-paĝa) artikolo pri esperanto « ***Une langue sans peuple*** » (lingvo sen popolo) en la belga gazeto « LE VIF/L'EXPRESS ».

**01-03** Malfermo de ttt-ejo pri ***Senlime*** por i-mode aparatoj (http://Senlime.ifrance.com).

**02-13** BE-Liège, datreveno de naskigxo de Georges Simenon, malfermo de la jaro « Simenon » (memorcele).

**03-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (ellaboro de nia agadplano 2003 - diversajxoj).

**04-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (programo decidota).

**05-10** 09h30 BE-Kelmis, Select: Re.Ve.Lo-tago (dato, horo kaj loko konfirmotaj, programo decidota).

**06-09** 14h00 BE-Kelmis, Select: festo de Neuxtrala Moresneto - foriro de promenado al la trilandlima punkto (1815-06-09 subskribis la Viena Kongreso provizoran interkonsenton pri la regiona neuxtraleco).

**Somera paŭzo**

**09-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (programo decidota).

**10-XX** XXhXX BE-Liège, Trilanda Renkontigxo pri Simenon : vizito de espozicio "*Simenon, un siècle*" kaj modernigita urba rondiro laux la « *spuroj de Simenon*" (dato, horo kaj loko precizigotaj).

**11-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: komuna kunveno de la lokaj grupoj (programo decidota).

**12-14** 11h15 BE-Kelmis, Select: Zamenhof-festo (1859-12-15 naskigxis Zamenhof ; ni cxiujare festas tiun datrevenon, kiu farigxis tago de literaturo kaj libro en esperanto, per komuna fest-tagmnangxo kaj kulturaj eroj)

***La komitato de Senlime petas ĉies helpon por organizi kunvenojn kaj precipe trilandajn renkontiĝojn.***

***Ĉu vi havas ideon pri vizitebla loko (eble aparte facila ebleco por tio ?), pri prelego, iu gaja vespero… ?***
***Nepre konatigu ĝin !***

Verviersa Angulo

Verviersa Esperanto Grupo

# Rapport annuel 2001-2002

**Komité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
Petit Jonckeu 18
4803 POLLEUR
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: R. Demarche
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Secrétaire: J.-M. Jacques
Place Verte 23 bte 3
4800 VERVIERS
Tél. 0486/947.957

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
Rue des Glacères 16
6001 MARCINELLE

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte n° **000-0245571-64** de:
Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est restée inchangée depuis sa création, il y a 10 ans.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 02-03 12 €**
**U.E.A. 2003 50 €**
**Senlime 2003 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année:**
***«cotisation de …. pour ….».***

Depuis quelques années, nous ne cessons de répéter ici une litanie quelque peu négative selon laquelle, au terme d'une nouvelle année d'activité, nous devons une fois de plus constater que, malgré la lente mais constante **progression** de l'espéranto au niveau mondial (à laquelle nous contribuons indirectement), les résultats obtenus au niveau local sont trop peu encourageants... Et d'enregistrer une **régression** ou, à tout le moins, une **stagnation** du nombre de nos membres.

Fort logiquement, la communauté espérantiste de Verviers a voulu compenser ces pertes en s'alliant avec ses amis voisins (avec lesquels elle entretenait des relations excellentes, presque intimes en raison de multiples rencontres, depuis des dizaines d'années - et qui sont encore confrontés à la même problématique). Pour cette raison, et pour rendre un sens à la pratique d'une langue internationale dans une région unilingue comme le grand Verviers, nous collaborons à présent étroitement avec l'Association **pour l'espéranto dans l'Eurégion Meuse-Rhin**": ***Senlime,*** fondée voici bientôt 10 ans (le 17 octobre 1993 à Kelmis) et dont le but est ***le renforcement de la compréhension entre les peuples à l'aide de la langue internationale Espéranto, surtout dans l'Eurégion Meuse-Rhin*** (art. 1 des statuts).

Le comité de ***Senlime*** a pris en charge une partie du travail autrefois laissé aux groupes locaux (essentiellement Verviers, Marnoland-grupo, Aachen) : organisation des rencontres des trois pays, contacts avec les espérantistes et la presse espérantiste, stages et cours,... Son but final était de remplacer les "groupuscules" locaux disparus (Soumagne, Eupen, Baelen, Welkenraedt,...) par une **puissante association "eurégionale"** qui aurait coordonné les activités des groupes restants (Liège, Verviers, Wijlre, Aachen,...). En pratique toutefois, ce comité – dans lequel le groupe de Verviers tend de plus en plus à jouer un rôle « moteur » - s'est progressivement retrouvé isolé face à des comités locaux quelque peu démotivés et inactifs…

La vie locale de l'espéranto se poursuit cependant : une réunion (conférence,...) par mois a lieu à Kelmis, à jour fixe (troisième vendredi du mois) et connaît un incontestable succès. Les réunions sont fréquentées par quinze à vingt personnes venant des trois groupes voisins et l'emploi de l'espéranto y est indispensable...

Avec **Internet**, nous disposons désormais d'un outil publicitaire et pédagogique de qualité qui pourrait être l'un des éléments d'une nouvelle croissance de l'espéranto, qui s'est enfin trouvé un "territoire" permanent, même s'il n'est que "virtuel" (alors que nos contacts se limitaient jusqu'ici aux réunions et congrès). Son impact « publicitaire » est incontestable. Ainsi, voici quelques jours seulement, fait exemplaire, une journaliste allemande (Sabine Rieck) travaillant pour la WDR à Aachen a découvert en surfant sur Internet l'existence du groupe espérantiste d'Aix et l'histoire de Neu-Moresnet. Conséquence : une séquence télévisée sur la question est maintenant en préparation…

A long terme, nous resterons à l'affût de **toute possibilité** qui se présenterait à Verviers ou dans son voisinage. La volonté de ne pas quitter la région se concrétisera d'ailleurs, par exemple, lors des rencontres des espérantistes des trois pays qui, cette année 2002 exceptionnellement, se seront toutes deux déroulées dans la région de Verviers. Ainsi marquons-nous notre présence et notre vitalité dans la région, au seuil d'un nouveau millénaire qui, nous n'en doutons pas, donnera à l'espéranto la place qu'il mérite.

*Extrait du rapport annuel présenté au Ministère de la Communauté française de Belgique pour l'obtention de la subvention annuelle 2003 (le texte intégral peut être consulté sur notre site internet).*